


La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

vendredon, la 28-an de Junio, 2013 • numero tri

Kio okazos hodiaŭ?

- ★ 7:30 – 8:15 atm
Matenmanĝo / Breakfast
Belk Dining Hall
- ★ 8:30 atm – tagmezo
Lecionoj
Flowe, unua etaĝo
- ★ 12:15 – 1:00 ptm
Tagmanĝo / Lunch
- ★ 2:00 – 3:00 ptm
Prezento pri dancmetodo
Flowe, unua etaĝo
- ★ 5:45 – 6:30 ptm: Vespermanĝo
- ★ 7:00 – 8:00 ptm: Libera tempo!



Morgaŭaj programoj

- ★ 2 – 5 ptm: Piedaj ekskursoj al la urbocentro de Raleigh
Ne malproksime de ni – ene de nur okminuta promeno, efektive – troviĝas pluraj mirindaj vidindaĵoj. Inter viaj multaj elektoj estas:
 - Muzeo de natursciencoj
 - Muzeo de historio
 - La Ŝtatodomo de Norda Karolino

Ĉiuj estas senpage enireblaj kaj ili situas en proksimume la sama loko. Hoss gvidos grupon tien, kaj poste ni disiĝos en grupojn por esplori laŭplaĉe.

La NASKa Fasko

Redaktejo: Finley 112
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro. Trovu ĝin matene sub via pordo aŭ en la komuna ĉambro ĉe la unua etaĝo de nia loĝejo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 112, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

Salutmesaĝo de José Antonio VERGARA

Ĉi-jare, instruisto José Antonio venas al NASK la unuan fojon. Li loĝas en suda Ĉilio.

Mi tre ĝojas ke ni havos la ŝancon kune lerni dum la venontaj tagoj. Ĉu kunlerni? Nu jes, ĉar mi fakte planas ne nur instrui sed ĉefe lerni de vi ĉiuj: mi opinias fascina la fakton ke ĉiu homo rigardas kaj spertas la mondon el sia propra perspektivo kaj do mi esperas ke ni povos utiligi nian komunan lingvon por vikle sed afable diskuti inter ni, pri diversaj interesaj temoj, ideoj kaj faktoj, alportitaj de ĉiuj. Mi ĉiam scivolemas kial estas homoj tiaj kiaj vi, kiuj emas okupiĝi pri Esperanto ĝis la punkto investi monon kaj tempon veni al Raleigh. Mi ŝatus scii, kiun rolon ĝi ludas en viaj unuopaj vivoj, kion vi faras aŭ volus fari per/por/kun ĝi, ktp.

Mi mem entuziasme lernis la lingvon komence de la 1980-aj jaroj, kiam mi



ankoraŭ estis revema knabo ĵus enirinta universitaton. Post tri jardekoj, mi plu restas nerespondece revema, entuziasma kaj knabeca ulo, kvankam intertempe mi iĝis edzo, patro, medicinisto, ktp. Mi restas daŭre enamiĝinta al Esperanto, kiun mi vidas esti profunde homa, kun-krea iniciato kolektiva. Dum

la kurso ni provos konatiĝi kun kelkaj aspektoj el ties historio kaj kulturaj atingoj.

La nuna okazo temas pri mia unua NASK-sperto. Mi serioze intencas intense ĝui ĝin dum mi faros ĉion eblan por kontribui al la plifortigo de via memfido en la regado de nia mirinda interlingvo. Ne hezitu proponi al mi ĉion ajn cele al nia komuna sukceso!

La dancmetodo de Margaret MORRIS

Nian hodiaŭan programon en la posttagmezo gvidas Minjo RENAUD, je la 2-a horo ptm en la unua etaĝo de Flowe. Venu, eksciu, kaj eble... dancu!



Margaret MORRIS (1891–1980) grave influis la modernan dancon. La prezentaĵo de Minjo estos en tri partoj:

- ★ Kiu estis Margaret Morris?
- ★ La principoj de ŝia dancmetodo.
- ★ Fine, ni iom ekzerĉigos per la dancmetodo en tri etapoj: varmigado, tekniko kaj improvizado.

Leterkesto

Dankmesaĝo

Mi estas profesoro Ricardo Salazar CRESPO kiu venas el "La perlo de la Antiloj" – insulo relative proksima kaj samtempe malproksima. Mi venas el Kubo.



Mi ne havas la privilegion rememori miajn elstarajn profesorojn de Esperanto. Mi mem estis/as mia profesoro pri nia kara lingvo.

Araba proverbo diras, ke libro estas ĝardeno kiun oni portas ĉe la poŝo; Esperanto estas juvelo kiun mi portas en la koro.

Mi dankas ĉiujn kiuj helpis por realigi mian revon vojaĝi en Usonon kaj al ĉiuj mi sendas varman brakumon. Mi profitas el la NASKa Fasko por mencii samideanon kiu estas mia usona frato kaj al kiu mi sendas varmegajn brakumon kaj miajn plej belajn kaj karesajn sentojn. Lia bonkoreco kaj helpemo estas mirindaj. Omaĝon al li. Mi parolas pri William R. HARMON.

Kiel diris nia nacia heroo José MARTI:

*"Mi kultivas blankan rozon
En Junio kaj Januaro
Por la sincera amiko
Kiu donas al mi la manon."*

Al ĉiuj senescepte: sanon, feliĉon kaj prosperon.

— Ricardo Salazar CRESPO

Por la naĝemuloj inter ni



Se vi volas naĝi, publika naĝejo troviĝas ne tro for de ni. Jen la adreso:

Pullen Aquatic Center
410 Ashe Ave, Raleigh, NC 27606

— Derek ROFF

Anonco – kaj peto de proponoj

La Kino-kaj-Teatro-Festivalo (Ko-To-Festo) okazos sur la insulo *Whidbey* (Vidbeo) en Vaŝingtonio dum la paska semajnfino en 2014. Ĉiuj estas bonvenaj!



La KoToFesto celas provizi fekundan grundon por kuraĝigi kreivon kaj kunlaboradon de ĉiu kiu verkas – aŭ eĉ iam revas pri verkado aŭ scena art-kreado. Per spektado, priparolado, kaj prezentado pri/de filmoj kaj aliaj scenaj artaĵoj, ni kuraĝigos novajn verkojn kaj ĝuos pli riĉan kulturon. **Ni petas proponojn de la Esperanto-komunumo pri la sekvaj punktoj:**

- Kiajn filmojn jam ekzistantaj vi ŝatus spekti kaj diskuti?
- Ĉu havas fakan sperton pri scenaj artoj kaj volus prelegi? Kontakti nin.
- Se vi interesiĝus patroni premion por nia Premia Vespero, kontakti nin.
- Ni serĉas spertulojn pri la jenaj ĝenroj por membriĝi al nia juĝantaro: animacio, dokumenta filmo, mallonga filmo, ĉeffilmo, teatraĵo, kanto
- Kaj super ĉio, novaj verkoj estas petataj por konkursi en la Festivalo.

Antaŭ la Festivalo, okazos Metieja Semajno por tiuj kiuj aparte interesiĝas pri kreema kunlaboro. Ni petas la jenajn proponojn:

1. Se vi iam havis ideon verki teatraĵon au krei filmon sed vi bezonas kunlaborantojn, la KoToFesto estu al vi inkubatoro. Proponu vian ideon, ĉu malgrandan, ĉu ampleksan, kaj se elektite por tiujara prilaboro, vi fariĝos parto de la kreema teamo kiu planos la metiejojn, gvidante sian propran projekton – aŭ mem, aŭ en teamo laŭ via prefero.
2. Se vi havas sperton au fortan intereson pri scenaj artoj kaj emas kunlabori pri diversaj projektoj, proponu vin kiel eblan membron de la talenta teamo. Sciigu nin pri via specifa sperto, talento, au intereso.
3. Se vi estas instruema kaj havas apartan sperton pri specifa parto de la scenaj artoj, proponu vin kiel instruiston al niaj metiejanoj.

Entute eblas esti parto de pli ol unu teamo, do indiku vian intereson, ni ĝoje anticipas fruktodonan kunlaboradon! El la proponoj ni ĉerpos kreeman, instrueman, kaj talentan teamojn laŭ la bezono de la projektoj pritraktotaj. (Jen por vi bona langtordilo.)

La unua projekto oficiale anoncata kiel metieja projekto estas mallonga teatraĵo kiu estas vido al bela filmskripto kiun verkis Amy WALKER. Ĝi estas familia dramedio* kiu tuŝas la manierojn per kiuj teĥnologio ligas kaj apartigas nin, kaj al la malsamaj manieroj en kiuj diversaj homoj esprimas sian amon. La projekto bezonas rolularon de dek du, je ĉiu aĝo.

Ni celas dum NASK kaj la LK provfilmi por tiuj roloj. Se vi havas ajnan sperton pri aktorado aŭ simple volus sperti provfilmadon, kontakti al Jenja BONDELID en ĉambro 105. Ŝi prilaboras la projekton dum la posttagmezoj, do aranĝu rendevjuon kaj vi ricevos mallongan skripton tralegi. Estos neniel prema atmosfero, oni anticipu ĝui la sperton! Eĉ se vi neniam aktoritis, povus esti ke vi (simple estante, kiu vi estas) estas la ĝusta persono por specifa rolo. Vi devos nur laŭtlegi el la skripto, ne necesas parkeri ion ajn. Do venu, provu, ĝuu! Ĉiuj estas bonvenaj!

— Jenja BONDELID (kun helpo de Georgo BAKER)

* ĝenro de filmo kiu bordas inter dramo kaj komedio